

Jacques Mühlethaler, 7-a parto
Claude Gacond, 127-a radioprelego, 1966.03.09 & 1966.03.12

Claude Gacond : Atentu esperantistoj ! Ĉi tie aŭdiĝas Svisa Kurtonda Radiostacio. Parolas Claude Gacond, Andrée Gacond kaj Cosette Giroud.

Ni daŭrigas la rakonton pri la porpaca pilgrimado de Jacques Mühlethaler.

Andrée : Dum la pasintaj elsendoj vi konatiĝis kun tiu ĝenevano Jacques Mühlethaler, kiu dediĉas sian vivon al la proklamo de la supernacia kaj homarana funkcio de la lernejoj. Li elektis Turkion por sia unua renkonto kun ŝtat-estroj kaj estis ricevita de la turka ĝenerala sekretario kaj de la ĝenerala direktoro de la turkia instruado.

Claude : Por festi pri la sukceso de la unua labor-semajno Jacques Mühlethaler decidis veturi la dimancon al Konja, la urbo de la turka poeto Mevlana, fondinto de la derviŝa mahometana movado. En la aŭtobuso li konatiĝis kun kuracisto, kiu ankaŭ veturis al Konja. La konversacio estis interesa kaj temis pri la turka vivo kaj poste pri la internacia vivo. La kuracisto raportis pri interesa artikolo ĵus legita la antaŭan tagon, artikolo, kiu asertas, ke la konstruo de la paco devas komenci sur la benkoj de la lernejo. Jacques Mühlethaler senvole ridetis kaj ruĝiĝis. Lia najbaro tion rimarkis kaj ĉarme diris : « *Oni foje faras feliĉigajn renkontojn.* »

Cosette : La posta semajno estis sufiĉe enuiga. La turka prezidanto estis en Italio kaj Jacques Mühlethaler nenion povis entrepreni pro atendado de la priaŭdienca informo. Por obei al la konsiloj de la direktoro Jorukoglu li komencis verki skribante siajn vojaĝimpresojn. Tiu taglibro poste aperos sub la titolo *Le voyage de l'espoir ou Le siège des sièges* [La vojaĝo de la espero aŭ la sieĝo de la sieĝoj.]

Claude : En tiu libro Jacques Mühlethaler interese rakontas siajn vojaĝ-travivaĵojn. La legadon de tiu libro ni konsilas al ĉiuj geaŭdantoj, kiuj komprenas la francan. Espereble iam aperos esperantigo de tiu konstruiga verko.

Andrée : Kun iomete da melankolio Jacques Mühlethaler finis tiun semajnon. Li antaŭsentis, kiom longos la entreprenita kampanjo. Ĉu li fizike kaj finance eltenos la longan porpacan pilgrimadon tra la vasta mondo ?

Claude : Kun tiuj malgajaj demandoj li revenis al la hotelo. La kelnero lin ricevis kun la hotela semajna fakturo. Ĝin legante Jacques miris. Ĝia fina sumo estis sufiĉe malpli alta, ol dum la pasintaj semajnoj. Li tuj iris averti la hotelestron pri tiu ebla eraro.

Cosette : « *Sed ne, sinjoro Mühlethaler, respondis la hotelestro, mi legis en la gazetaro pri la kaŭzo de via ĉeesto en Turkio. Tiu eta malpliigo estu modesta kontribuo al via entreprenitaĵo.* »

Claude : Tiu semajnfino, kiu antaŭ kelkaj minutoj anonciĝis morna, subite fariĝis lume ĝoja. Tiu absolute neatendita subteno estis nova kuraĝiga signo por antaŭeniri.

Andrée : London la respublika sekretario kunvokis Jacques Mühlethaler.

Claude : « *Ĉio tre bone progresas, li diris. Tamen estus preferinde renkonti nian moŝtan prezidanton en Istanbul, okaze de lia reveno el Italio. Li restados kelkajn tagojn tie por ripozi.* »

Cosette : Jacques Mühlethaler rondiris por danki ĉiujn renkontitojn. Li telefone avertis la direktoron Jorukoglu pri sia forveturo.

Claude : « *Ne forveturu sen reveni en mian oficejon, respondis la edukestro. Venu tuj !* »

Jacques Mühlethaler, 7-a parto
Claude Gacond, 127-a radioprelego, 1966.03.09 & 1966.03.12

Andrée : Tiu altrangulo plian fojon esprimis sian simpatian por la entreprenita kampanjo. Li ankaŭ varme dankis pro ricevo de eta rakonto, kiun Jacques Mühlethaler estis al li dediĉinta verkprovo.

Claude : Post kelktaga restado en Istanbul alvenis fine mesaĝo de la direktoro de la respubliko. Estis invito veni trinki teon en la prezidantan palacon Florida kun la prezidanto.

Cosette : Tiu unua renkontiĝo kun ŝtat-estro estis eksterordinara, kiel ĉiuj aŭdiencoj okazintaj en Turkio. La turka prezidanto dediĉis du horojn por informiĝi pri la intencoj de nia ĝenevano. Lin ankaŭ maltrankviligis la lernejaj problemoj kaj li esprimis sian intereson por agado, kiu reliefigu la supernaciecon de la instruado. Li volis koni la reagojn de la kontaktitaj personoj kaj mem donis instrukciojn por organizo de ĵurnalista konferenco. Li opiniis, ke la publiko devas esti kiel eble plej larĝe informata pri tiu ekagado.

Claude : Dum ili trinkis teon, Jacques rigardadis la maron. Li atente aŭskultis la konsilojn de tiu simpatia ŝtatestro. Multaj el liaj diroj gravuriĝis en lian memoron.

Andrée : Du tagojn poste okazis la ĵurnalista konferenco sub la estrado de la direktoro de la porinforma oficejo. Preskaŭ ĉiuj gazetoj estis sendintaj reprezentanton. La ĵurnaloj poste detalege raportis pri la neceso emancipadi la lernejojn de la naciaj kuratorejoj kaj pri la neceso vekti la infanaron al nova socia kompreno kondukanta al vera homaranismo.

Claude : Per tiu prelego antaŭ la ĵurnalistoj de tiu gastema lando finiĝis la kontakto kun Turkio. Revenante al sia hotelo Jacques Mühlethaler konstatis, ke lia pac-strategio efikas. Dum tiu restado en Turkio li ne predikis en dezerto. Li estis ricevinta sufiĉe da helpo-signoj por senti, ke ne nur en la popolaj tavoloj oni sopiras al paco, sed ankaŭ en la registaraj medioj. Lia kampanjo estis verŝajne senkonscie atendata. Kaj li ankaŭ sentis la bezonon verki dokumenton, kiu estu donebla dum prelegoj kaj aŭdiencoj. Tiu dokumento resumu liajn intencojn.

Trio : Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond, Andrée Gacond kaj Cosette Giroud diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-